

# juna amiko

majo 2017 • n-ro 2/2017 (151)

kacj  
owej  
z

ącz,  
F7  
.pl




LUDWIK ZAMENHOF  
de jezika  
ANTICIPAJE  
FONDA KONTAKTO  
PRACONJA ENJO  
KUN HORTALISTO

OK

INTERNACIA  
ESPERANTO-REVUO  
DE ILEI  
POR LERNANTOJ  
KAJ KOMENCANTOJ

Festanta verda Słupsk  
Ŝipekskurso sur Danubo  
Diplomo pro Esperanta evento  
Sidi en laboroj ĝis super la oreloj  
Arto el Bronza Epoko. Bastonĉevaloj





# Enhavo



**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) ..... 4



**Konversaciaj temoj:** Ŝipekskurso sur riverego Danubo (Judit Felszeghy, HU) ..... 5



**Ni gratulas:** Diplomo pro Esperanta evento (Aranka Laslo, RS) ..... 10



**LUME:** El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) ..... 11



**Poezio:** Termopilo (Konstantinos Kavafis, GR) ..... 13



**LUDE, la unika dua etaĝo:** Sidi en laboroj ĝis super la oreloj (Mónika Molnár, CH) ..... 14



**Enigmaj el Japanio** (Hori Jasuo, JP) ..... 16



**Rakonto:** Taso da freŝa lakto (Ji Yingeng, CN) ..... 17



**Legu kaj ĝuu:** "Tutmonda Himno de la Libro", de Unesko. (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 18



**Fabelo:** La riza urseto (Luiza Carol, IL) ... 20



**Kantu kun Juna Amiko:** La sorĉa kanto-mondo (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 24



**Interkultura Mondo:** Nia Unua Lernolibro de la lingvo (Elena Nadikova, RU) ..... 26



**Kluba agado pere de Juna Amiko** (Luiza Carol, IS) ... 28

**Arto el Bronza Epoko** (Raita Pyhälä, FR) ..... 29



**Sporto:** Bastonĉevaloj (Raita Pyhälä, FR) ..... 29

**Rakonto pri tarfolioj** (Mirejo Grosjean, CH) .... 31



**Pripensu:** Kiom stultan penson mi havis! (Mirejo Grosjean, CH) ..... 32

**Nature:** Serpentoj (Jose de J Campos Pacheco, CU) ..... 33



**Strigo de Dijono** (Olivier Buisson, FR) ..... 34

**Poezio:** Poemo de Nazim Hikmet (Renato Corsetti, IT) ..... 36



**LASTE:** Heliko hastis hejmen! (Stefan MacGill, HU/NZ) ..... 37

**Landaj Perantoj** ..... 38

**Festanta verda Ŝtupsk** (Halina Comar, PL) ..... 39

**Eldonanto de Juna amiko:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe [ilei.mondo.info](http://ilei.mondo.info). Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ [lernu.net](http://www.edukado.net) kaj [edukado.net](http://www.edukado.net). **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio), Doi Ĉieko (Japanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ĉiuj el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprich, [ILEI.Oficejo@gmail.com](mailto:ILEI.Oficejo@gmail.com). **Landaj Perantoj** sur la p. 38. La sekva numero aperos en majo 2017. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** €18 en tiel nomataj A-landoj kaj €13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€15 kaj €12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318

## Karaj amikoj!

**A**l Eŭropo, kie naskiĝas *Juna Amiko*, venis la longe atendata printempo, la monato de amo, floranta majo... Kaj jam proksimiĝas la somero, ferioj, libertempoj...

Jen do nia invito ŝipekskursi en Hungario, gratuli al gejunuloj en Serbio pro la sukcesa lingva metiejo, fari nian mondon pli kolora en la rubriko LUME kaj reveni per poemo duonjarcenton antaŭ nia erao al la antikva Grekio. Vi povas admiri belajn desegnaĵojn kaj ĝui rakontojn de svisaj infanoj en la rubriko LUDE kaj solvi bongustan enigmon el Japanio. Kortuŝa rakonto pri taso da freŝa lakto gvidos vin al Ĉinio, la rubriko Legu kaj ĝuu rekomendos belan polan libron



pri malnovaj fabeloj. Aliaj fabelon pri orfaj ursetoj rakontos al vi nia israela aŭtorino. Sed ne nur migri tra la mondo,

ankaŭ kanti vi povas kun *Juna Amiko*: la kanton *La gaja migranto* tradukis Ludoviko Zamenhof. Poste vi povas daŭrigi la migradon al Japanio, kie esperantistoj preparis belan ekspozicion pri infanaj ABC-libroj, viziti pupteatraĵon en Israelo, faritan laŭ artikolo en *Juna Amiko*, viziti gravuraĵojn sur rokoj en Skandinavio, rajdi sur bastonĉevaloj en Finnlando, migri al Afriko, konatiĝi kun serpentoj kaj Strigo en Francio, legi poemon Donkiĥoto de turka poeto, hasti hejmen kun heliko en la rubriko LASTE kaj festi centan datrevenon de la morto de Zamenhof en Pollando... – Agrablan legadon!

Via redaktoro **Stano Marček**

## Karaj legantoj!

**R**akontoj abundas en tiu ĉi numero de via revuo *Juna Amiko*. Rakontoj el Serbio, Hungario, Japanio, Greklando, Turkio, Francio, Svislando, Pollando, Finnlando, Israelo, Ĉinio, Afriko. Aperas informoj pri antikva Greklando kaj malnova Finnlando, kaj ankaŭ pri plej modernaj trajnlinioj boritaj tra la svisaj montoj, la Alpoj. Vi povos legi ne nur prozon, sed poeziaĵojn kaj kantojn. Vi povos ne nur legi, sed kanti, desegni, diveni, cerbumi, lertiĝi. Vi vidos du alfabetojn: nian kutiman, la latinan, kaj la grekan. Vi renkontiĝos kun bestoj: serpentoj, helikoj, bastonĉevaloj kaj rizaj ursetoj. Vi povos vojaĝi per trajnoj, ŝipoj, tra/laŭ stratoj kaj tuneloj. Do tiu ĉi kajero transportos vin tra la tuta mondo!

Dek sep personoj kontribuis al tiu ĉi numero de *Juna Amiko*! Plus nia fidela redaktoro Stano Marček. Granda danko iras al ili ĉiuj!

**Mireille Grosjean**  
Prezidanto de ILEI



En la haveno de la urbo Neuchâtel, Svislando.



# Ŝipekskurso sur riverego Danubo

Help-materialo por ekzamenotoj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

## I. La ideo

**Esperantistaj geamikoj el diversaj landoj babilas dum renkontiĝo, ie meze de Eŭropo. Andreo (A), Bianka (B), Davido (D), Kristina (K), Laslo (L), Marta (M), Nora (N), Roberto (R).**

K – En tiu ĉi semajnfino estos varma, suna vetero. Kion ni faru? Jam nun estas pli ol 20 gradoj!

A – Ni faru ekskurson!

M – Ni iru al plaĝo!

B – Mi ne povas naĝi, kion mi faru sur la plaĝo? Ekskurso kun promenado en freŝa aero estas pli bona ideo!

N – Aŭ en bela urbo, kun vizito de kafejo aŭ glaciaĵejo!

D – Kial ni sidadu en kafejo aŭ marŝadu surstrate, inter malnovaj konstruaĵoj kaj palacoj, kiam sunas! En tia vetero ni nepre iru proksimen al akvo!

L – Jen, ideo! Ĝi ĵus enkapiĝis al mi!

K – Do, kion vi pripensis?

D – Diru jam!

L – Geknaboj, ĉu vi deziras fari ekskurson, vidi arbojn, ĝui freŝan aeron, kaj ankaŭ belegan urbon? Ĉu vi deziras samtempe ĝui ankaŭ la sunon, trinki kafon, frandi glaciaĵojn kaj daŭre resti proksime al akvo, ekzemple al belega riverego?

B – ?

A – Ja jes, certe!

R – Ne plu sekretu, kio do naskiĝis en via kapo?

L – Jen la ideo: Ŝipekskurso sur la riverego Danubo, inter la urboj Budapeŝto kaj Esztergom (estergom). Dum la 3,5 horoj, kiam ni veturos laŭ Danubo supren, ni vidos la arkitekturajn monumentojn, palacojn, preĝejojn kaj fortikaĵojn, valojn kaj montojn de

la belega Danubkurbiĝo, arbarojn kaj promenejojn, dume laŭvole aŭskulti muzikon aŭ la plaŭdadon de la ondoj.

R – Tre bone! Al mi plaĉas la ideo!

K – Ankaŭ al mi! Kiel ni atingos tiun ŝipon?

N – Kaj kio pri la glaciaĵo?

L – La glaciaĵojn ni ricevos dumvoje; oni priservos nin per ĝi, sur la ferdeko de la ŝipo!

D – Kiam ni veturos tien?

L – Ni tuj ekveturos trajne al la tre ĉarma urbeto Esztergom, kie ni kaptos la ŝipon! Post unuhora veturado ni atingos la urbon Esztergom!

Ĉiuj – Bonege! Ek'!

## II. Ne estas facile atingi la ŝipon!

**Andreo (A), Bianka (B), Davido (D), Kristina (K), Laslo (L), Marta (M), Nora (N), Roberto (R) babilas dumvoje, en la stacidomo, poste en trajno, kaj poste piedirante al la navighalto kun la biletistoj de la trajno (BT) kaj de la ŝipo (BŜ).**

L – Jen la stacidomo, nun ni kontrolu, de kie veturos la trajno al Esztergom!

L – Rigardu, sur la flava afiŝo estas la horaro! Kien... Esztergom... je la oka kaj dudek... kajo numero 2. Ni havas ankoraŭ dudek minutojn. Mi aĉetos la biletojn.

B – Mi aĉetos ion por trinki. Por kiu mi alportu ion?

D – Mi iros kun vi.

K – Por mi bonvolu botelon da akvo.

L – Vi ĝustatempe revenis; la trajno jam alvenis. Rapidu!

BT – Bonan tagon, gejunuloj! Kien vi veturas?



## Konversaciaj temoj

- L – Al Esztergom. Jen la biletoj. Nur mi parolas hungare. Ĉu ni ne malfruos?
- BT – Ni alvenos akurate, je la naŭa kaj kvardek kvin. Jen viaj biletoj; ili estas nur unudirektaj.
- L – Jes, en ordo! Ni pluveturos ŝipe al Budapeŝto!
- BT – Tio estos bela vojaĝo! Ĉion bonan, ĝis revido!
- L – Ĝis revido!
- ....
- L – Ni jam baldaŭ alvenos! Kolektu viajn aĵojn! Ho, Roberto eĉ endormiĝis! Nora, bonvolu veki lin milde!
- M – Esztergom! Ni alvenis!
- L – Ni eltrajniĝu rapide; ne longe staradas la trajno ĉi tie!
- L – Ni devos iom piedmarŝi ĝis la navighaltejo.
- D – Al kiu direkto nun?
- L – Hm... mi devas iom orientiĝi... Danubo devas esti tie... Sed ... Necesas demandi iun, atendu min ĉi tie!
- L – La sinjorino, al kiu mi min turnis, diris, ke la navighaltejo troviĝas tute proksime; ni devas iri rekte antaŭen, preter malgranda parko, ĝis ni atingos vastan straton, tie maldekstren, kaj post du kruciĝoj dekstren, ĉe la sekva kruciĝo denove maldekstren, ĝis la promenejo, tie dekstren, tra iri ponteton, poste jam nur tute rekte antaŭen.
- N – La virino diris, ke la ŝipo-haltejo troviĝas proksime, ĉu ne? Ni jam marŝadas almenaŭ duonhoron!
- M – Vi eraras; pasis ankoraŭ nur dek minutoj! Sed en tia varmo la irado ŝajnas pli longa!
- D – Kaj nun? Ĉu dekstren? Ĉu maldekstren? Ĉu plu antaŭen?
- R – Ĉu ni jam preterpasis la malgrandan parkon?
- D – Laĉjo, bonvolu demandi denove, kien ni iru!
- L – Mi estas certa, ke ni devas pluir antaŭen!
- N – Ve, mi estas jam terure laca!
- M – Tamen ĝuste vi proponis promenadon enurban!
- L – Jen la vasta strato! Laŭ mi nun ni devas turni nin jam maldekstren!
- N – Kiu havas ankoraŭ iom da trinkaĵo? Mi tuj mortos, se mi ne ricevos almenaŭ akvon!
- D – Eltenu ankoraŭ! Ni devas esti jam proksime!
- R – Rigardu, ni nun marŝas en strato nomita “Eszperanto”! Tio estas Esperanto, ĉu?
- K – Jes, vere! Mi fotas nin... haltu tie! Subtitolo “Esperantistoj sur Esperanto esperante...” – ke nia haveneto estas jam vere proksima!
- B – Jen Danubo! Jen la ŝipo!
- A – Ni alvenis finfine!

BŜ – Geknaboj! Pli freŝe, pli rapide! Ĉu al Budapeŝto? Ni baldaŭ ekiros!

M – Laĉjo, kuru, aĉetu 8 biletojn!

BŜ – Enŝipiĝu geknaboj, sur la ponteto atente... nun paŝon pli grandan! Bone! Knaboj, lasu la knabinojn unue... du, tri, kvar... kvin, ses, sep... vi estas ok, ĉu?

L – Jen la biletoj!

N, B – Ho, la riverego Danubo! Kia odoro! Kiel mirinda ĝi estas!





### III. En la ŝipo sur la granda rivero

**Andreo (A), Bianka (B), Davido (D), Kristina (K), Laslo (L), Marta (M), Nora (N), Roberto (R) babilas dumvoje, en la ŝipo kun la Kelnerino (Ke) de la ŝipo.**

B – Kien ni iru?

D – Ni staru ĉe la barilo, sur la antaŭa ferdeko!

K – Ni prefere sidiĝu malantaŭe; tie estas benkoj, sub ŝirmilo kontraŭ la suno!

R – Jam ĉiuj estas okupataj!

N – Ni iru suben, tie troveblas ankoraŭ liberaj lokoj!

A – Tie ni vidos preskaŭ neniom el la pejzaĝo!

M – Vi pravas! Do, ni reiru supren! Nu ĝuu tie la freŝigan aeron de la rivero!

N – Ni decidu rapide, ĉar mi estas lacega!

D – Geamikoj, jen la ideala loko! Venu, venu! Tabloj kaj komfortaj seĝoj sub sunombreloj!

B – Bonega ideo!

L – Urĝe! Ni estas alvenantaj al la sekva stacio; rigardu, kiom da vojaĝantoj atendas tie, por enŝipiĝi!

N – Ho, finfine eblas sidiĝi! Ni mendu glaciaĵon!

Ke – Saluton! Kion mi alportu por vi?

L – Ĉu vi havas glaciaĵon?

Ke – Jes, ĉokolada, vanila kaj kun frago.

L – Bonvolu 8 porciojn da glaciaĵoj, miksitajn!

N – Kun kremoj!

L – Kaj 2 tasojn da kafo!

M – Ankaŭ akvon, bonvolu, ok glasojn da akvo!

Ke – Jen la glaciaĵoj kaj la akvo... la kafo por vi... bonan apetiton!





- L – Rigardu, kiel belegaj montoj estas nun ĉirkaŭ ni! Jes, nun ni naĝas suden ĉe la fama Danubkurbiĝo; ĝis tiu loko la riverego fluas orienten, kaj inter la montoj ĝi turniĝas suden.
- B – Belega pejzaĝo!
- R – Al mi aparte plaĉas la fortikaĵo sur la montopinto! Oni sciis siatempe, kien kaj kiel konstrui fortikaĵojn!
- K – Mi fotis ankaŭ tion, kune kun vi ĉiuj!
- A – Rigardu maldekstren, kiel ĉarma urbeto! Antaŭ ĝi la riverego, malantaŭe verdaj montoj!
- R – Vere bonegan ekskurson vi proponis al ni, Laĉjo! Ni povas komforte sidi, kun glaciaĵo kaj kafo, dume rigardi belajn pejzaĝon kaj urbetojn!
- B – Kie ni troviĝas nun?
- L – Rigardu la mapon! Nun ni flosas ĉi tie, ni jam lasis malantaŭ ni la urbeton Nagymaros (nadjmaroš) kaj proksimiĝas al pli granda urbo, Vác (vac).
- R – Jam post nelonge subiros la suno; ni jam ripozis, manĝis, trinkis; mi proponas reiri al la supra ferdeko por eluzi la tempon, kaj rigardi la pejzaĝon!
- L – Vác estis episkopa urbo, same kiel Esztergom; tial videblas ankaŭ ĉi tie la kupoloj de katedralo, kaj multaj belegaj konstruaĵoj...
- D – Foje ni devas viziti ankaŭ tiun ĉi urbeton!
- L – Jen, jam la lumoj de Budapeŝto! Ni alvenis!



- L – Ni baldaŭ elŝipiĝos, kolektu viajn aĵojn... Ni proksimiĝu al la ponteto por alboridi!
- N – Ĝis revido, belega Danubo!

## Taskoj

I.

- Legu atente la 3 dialogojn, unu post la alia, kaj kolektu la nekonatajn vortojn!
- Legu la dialogojn laŭte, kaj respondu tuj post la legado la demandojn:
  - a) Kiom da knabinoj kaj kiom da knaboj estis en la grupo?
  - b) Vicigu, kiujn programojn proponis la geknaboj por la semajnfino!





- c) Kiu programo plaĉis al vi pleje kaj kial?
- ĉ) Kion demandis unu el ili al la biletisto de la trajno?
- d) Vicigu la pretekstojn de la geknaboj!
- e) Pri kio plendis la geknaboj dumvoje, piedirante?
- f) Kiel ili eksciis, laŭ kiu vojo iri al la navighalto?
- g) Proksimume, kiom longe ili marŝis?
- h) Kion fotis dumvoje unu el ili?
- i) Kiu alparolis ilin unue, alveninte al la ŝipo, kaj kion li diris?
- j) Kiujn vidindaĵojn renkontis la geknaboj dumvoje, veturante en la ŝipo?
- Kolektu vortojn, kiuj povas anstataŭi la verbon “estas”!
- Kolektu la vortojn kaj esprimojn, kiuj rilatas ŝipon kaj akvan veturadon, kolektu vortojn ankaŭ ekster la supraj dialogoj!

## II.

- Rakontu, kiel atingi
  - a) vian hejmon el la plej proksima fervoja stacidomo;
  - b) 3 interesajn vidindaĵojn de via regiono, el via hejmo!
- Rakontu, kio okazas en la unuopaj ĉapitroj, sen rigardi ilin, kaj ne uzu dialogojn!

- Prezentu mallongajn dialogojn kun viaj partneroj, en kiuj vi
  - a) aĉetas 8 unudirektajn trajnbiletojn ĉe la kaso en fervoja stacidomo,
  - b) demandas preteriranton pri la direkto al la navighaltejo,
  - c) demandas iun ŝipanon pri la preciza loko kaj tempo de la alveno de la ŝipo.

## III.

- Skribu leteron (en 12 – 17 linioj) al via korespondamiko pri ekskurso al alia urbo, en kiu vi rakontu,
  - a) ke vi volis viziti vian amikinin,
  - b) kiel vi preparis vin por la vojaĝo,
  - c) kiel vi aĉetis la biletojn,
  - d) kia estis la vojaĝo kaj la alveno!
- Rakontu pri via lasta vojaĝo al viaj geamikoj (daŭro: ĉirkaŭ 5 minutoj)!
- Preparu planon pri vojaĝo kaj urborigardado kun promenado en via urbo por eksterlandaj gastoj!
- Preparu ĉirkaŭ 15/20-minutan prelegon pri via plej interesa vojaĝo por klubanoj aŭ samklasanoj!

## Vortklarigoj

*Fortikaĵo:* konstruaĵo por milita defendo.

*Danubkurbiĝo:* kurba parto de la rivero

Danubo. *Ferdeko:* granda planko sur la ŝipo.

*Navighalto:* Loko, kie dum kelka tempo haltas ŝipo aŭ aviadilo en sia kurso.

*Vasta:* longa kaj larĝa, kovranta grandan spacon. *Barilo:* vico da palisoj, obstaklo.

*Okupata:* ne libera, plena. *Pejzaĝo:* pitoreska loko aŭ vidaĵo.

*Vicigi:* meti aŭ starigi en unu linion. *Preteksto:* ŝajna motivo por kaŝi la veron.

*Plendi:* esprimi per vortoj malkontenton aŭ doloron.






Ni gratulas

# Diplomo pro Esperanta evento

Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj (Konsilio de Eŭropo, Graz, Aŭstrio) laŭdis la Politeknikan Lernejon kaj la Esperanto-societon "Tibor Sekelj" el Subotica, Serbio, pro la organizo de lingva evento okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj.



**L**a metiejo okazis la 26-an de septembro 2016 en la Politeknika Lernejo en Subotica, kie jam 3 jarojn funkcias la Esperanto-fakrondo.

La menciita metiejo konsistis el kvizo pri lingvoj kaj informa prelego pri Esperanto. Ĝin gvidis Aranka Laslo, instruistino de la lernejo kaj sekretariino de Esperanto-Societo de Tibor Sekelj en Subotica, hungare kaj serbe, aparte. La du instruhorojn partoprenis entute 76 gelernantoj kaj 2 profesoroj.

La rezultoj de la reta voĉdonado por la grandnombraj lingvaj eventoj (ne nur en Eŭropo) estis aperigitaj en marto 2017. La evento en la Politeknika Lernejo en Subotica ricevis la plej multajn voĉojn en Serbio, el entute 15 lingvaj manifestacioj en la lando.

Aranka Laslo



# El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, bestojn kaj homojn! Kion ili faras? Kiajn vestojn portas la homoj? Kiajn kolorojn havas la objektoj, bestoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildoj? Ĉu ili estas egalaj?





Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, bestojn kaj homojn! Kion ili faras? Kiajn vestojn portas la homoj? Kiajn kolorojn havas la objektoj, bestoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo? Kiajn diferencoj estas inter la suba kaj supra bildoj?



Konstantinos Kavafis:

# Termopilo\*

*Honoron al tiuj, kiuj dum sia vivo  
decidis kaj gardas Termopilon!  
Neniam forestantaj el la devo;  
justaj kaj honestaj en ĉiuj siaj agoj,  
sed ankaŭ kun korfavoro kaj kompato;  
donacemaj kiam ili estas riĉaj, kaj kiam  
ili ne estas riĉaj, same iomete  
donacemaj,  
same helpantaj tiel, kiel ili povas;  
dirantaj la veron ĉiam,  
tamen, senmalame al la mensoguloj.  
Kaj honoron plian ili meritas,  
kiam ili antaŭvidas (kaj multaj ja  
antaŭvidas),  
ke Efialto fine aperos,  
kaj la persoj finfine trairos.*

Tradukis Eftimjo Mavrogeorgiadis  
Ŝanĝetis Renato Corsetti




\*) Klariga noto: Termopilo [Θερμοπύλαι] estas la nomo de loko en Grekio, tre mallarĝa spaco inter la monto kaj la maro, kie en la jaro 480-a antaŭ la komuna erao 300 soldatoj el Sparto, estrataj de la reĝo Leonido [Λεωνίδας], haltigis la grandan armeon de la persa reĝo Ŝaŝajarŝao (en la okcidento konata kiel Kserkso). Greka paŝtisto, Efialto [Εφιάλης], tamen montris al la persoj vojon tra la montoj por ĉirkaŭiri Termopilon. Ĉiuj spartaj soldatoj estis mortigataj. En la okcidento la rakonto pri Termopilo estas konata kiel rakonto de granda heroaĵo. Kavafis utiligas ĝin por glorigi homojn, kiuj agas laŭ justeco kaj homeco malgraŭ ĉiuj malhelpoj.

## Θερμοπύλες

Τιμή σ' εκείνους όπου στην  
ζωή των  
ώρισαν και φυλάγουν  
Θερμοπύλες.  
Ποτέ από το χρέος μη  
κινούντες·  
δίκαιοι κ' ίσιοι σ' όλες των τες  
πράξεις,  
αλλά με λύπη κιόλας κ'  
ευσπλαχνία·  
γενναίοι οσάκις είναι πλούσιοι,  
κι όταν  
είναι πτωχοί, πάλ' εις μικρόν γενναίοι,  
πάλι συντρέχοντες όσο μπορούνε·  
πάντοτε την αλήθεια ομιλούντες,  
πλην χωρίς μίσος για τους ψευδομένους.  
Και περισσότερη τιμή τούς πρέπει  
όταν προβλέπουν (και πολλοί προβλέπουν)  
πως ο Εφιάλης θα φανεί στο τέλος,  
κ' οι Μήδοι επί τέλους θα διαβούνε.  
(Από τα Ποιήματα 1897-1933, Ίκαρος 1984)



# Sidi en laboroj ĝis super la oreloj



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**

**Ulideto, la eta ulido de la infanĝardeno, eble estis la plej bona amiko de Ĝojulido, la ĝoja ulido, kiu frekventis jam la grandan lernejon.**


**I**li tre bone interkompreniĝis kaj malgraŭ la granda aĝ-diferenco, ili ĉiam trovis iun komunan temon por pridiskuti aŭ simple kunludi. Ulideto tre ŝatis tion. Li ĉiam senpacience atendis la momenton, kiam Ĝojulido finis la hejmtaskojn kaj povis ludi kun li. Sed...

Ho, ve! La granda frato pli kaj pli ofte diris al li: “Mi bedaŭras Ulideto, mi ne havas tempon.” aŭ “Ne, ne nun, mi havas tro da hejmtaskoj.” aŭ ankoraŭ “Jes, mi finis la hejmtaskojn, sed mi estas vere tro laca. Ni ludos kune eble morgaŭ. Ĉu bone?”

Ulideto ŝatintus diri, eĉ ne diri, sed kriegi: “Ne, tute ne estas bone!” Tamen li diris fine nenion, sed li estis tre trista.

Tiel okazis ankaŭ tiun printemp-finan tagon, kiam li sola sidis antaŭ la familia biblioteko kaj trovis la jenan rakonton de Anne De Bernardini pri la laborema prociono, alinome lav-urso:

		
<p><b>Anne De Bernardini: La Prociono</b></p>	<p>La prociono estis lavistino. Ŝi lavis la vestaĵojn de aliaj personoj de la arbaro. Unue malmulte, poste ĉiam pli kaj pli.</p>	<p>Ŝi estis tre bona lavistino, laboris bone, la vestaĵoj estis ĉiam tre puraj. Sed ŝi iom post iom havis tro da vestaĵoj por lavi kaj ŝi estis tre laca.</p>



Ŝi ne sciis kion fari.  
Tiam ŝi pensis pri la saĝa strigo. Eble li povos doni konsilojn. Do, ŝi iris al la strigo kaj rakontis al li ĉion.

– Kara Strigo, mi sentas min vere tro laca.  
– Kial vi estas tiom laca?  
– Mi havas tro da vestaĵoj por lavi kaj mi ne plu povas dormi.  
La strigo forte pripensis.

Por bone kompreni la problemon, ili iris al la prociono. Tie la strigo ekhavis bonan ideon.  
– Telefonu al via kuzino, por peti helpon.  
– Bona ideo! - diris ŝi.



– Jes, tre volonte. – diris la kuzino. – Mi venos al vi morgaŭ per trajno.  
– Koran dankon!  
– Ne dankinde.  
La granda filo de la prociono atendis ŝin en la stacidomo kaj ili kune iris en la domon de la prociono, kiu havis tro da vestaĵoj por lavi.

La strigo foriris kaj la prociono telefonis:  
– Kara kuzino, kiel vi fartas sur via insulo?  
– Dankon, tre bone. La strando estas belega.  
Kial vi vokas min?

– Vi scias, ke mi estas lavistino, sed nun mi havas tro da vestaĵoj kaj mi bezonas personon, kiu helpus min. Ĉu vi povus veni helpi min? – demandis la prociono.





Jam dum la rakonto Ulideto ofte pensis pri Ĝojulido, ĉar la situacio de la granda frato multe similis al tiu de la prociono, almenaŭ laŭ Ulideto. Li jam eĉ trovis la solvon. Kun fiera mieno li prezentis ĝin al Ĝojulido:

– Ĝojulido, vi bezonas helpon! Vi estas kiel la prociono, la lavendaj vestaĵoj estas la farendaj hejmtaskoj, kaj la personoj, kiuj alportas la lavendajn vestaĵojn, estas la instruistoj, kiuj alportas la farendajn hejmtaskojn. Ĉu vi vidas? La prociono

ricevis helpon kaj ĉio bone finiĝis. Do, ankaŭ vi bezonas helpon! Kiun mi voku por vi?

Ĝojulido estis tre flatita de la infana propono. Evidente, li tamen ne povis akcepti tiun helpon, do li provis klarigi tion jene al la etulo:



– Ho, kara mia Ulideto! Dankon pro la propono; tamen mi ne povas akcepti tion. En vian komparon enŝoviĝis granda eraro! Tiuj lavendaj vestaĵoj estis lavitaj de la prociono por la bono de aliaj personoj, dum la farendaj hejmtaskoj devas esti faritaj de mi por mia propra bono. Ĉu vi komprenas?

– Eble jes. – respondis iom hezite Ulideto.

– Tamen mi povas promesi al vi ion, – daŭrigis Ĝojulido. – Hodiaŭ, post kiam mi finos la hejmtaskojn, mi certege trovos tempon por ludi kun vi. Ĉu bone? Ĉu vi komprenas tion?

– Ho jes! Tion mi komprenas kaj jam antaŭĝojegas!

Dankon Ĝojulido, koran dankon!

Jen ĉio bonas, se la fino bonas. Ĝis la sekva epizodo!



Hori Jasuo

# Enigmoj pri Japanio

## Ĉu bongusta?

**A**ĥ, ĉiuj ŝajnas tre bongustaj! Tamen, kial la supo en la tasoj en la plej supra breto ne gutas? Ĉu ŝaŭmo en la bierkruĉo ne malaperos?

En ĉiuj japanaj restoracioj oni montras tiajn “kuirajojn” en la montrofenestro, por ke klientoj tuj povu vidi, kiajn kuiraĵojn tiu restoracio donos. Eĉ eksterlandaj turistoj povas facile



elekti kuiraĵon. Ĉiuj “mangĝaĵoj” en la foto estas ne manĝeblaj, ĉar ili estas faritaj el plasto. Nun tiuj delikate faritaj plastaĵoj estas tre ŝatataj de eksterlandaj turistoj kiel donacoj.





Ji Yingeng

# Taso da freŝa lakto



**Antaŭ dek jaroj povra studento He Wude de pordo al pordo akceladis la vendon de varoj, por pagi la lernokotizon.**

**I**uvespere li sentis sin malsatega, sed en lia poŝo estis nur unu kuprero. Sur la strato li hezitis kaj iradis longe tien kaj reen. Finfine li prenis al si kuraĝon kaj frapis sur la pordo de iu domo. Li volis peti iomete da nutraĵo por manĝi. Sed tamen, kiam juna kaj bela fraŭlino malfermis la pordon, li perdis kuraĝon. Li ne aŭdacis peti pri la nutraĵo. Li nur petis tason da akvo, sed lia malsatego klare legiĝis sur lia vizaĝo. La fraŭlino donis al li grandan tason da lakto. Li senhaste fintrinkis la lakton kaj demandis: “Kiom da mono mi devas pagi al vi?” La fraŭlino respondis: “Vi ŝuldas al mi nenion. Mia patrino diris al mi: “Ne postulu rekompencan por la bonaj agoj.” Li sentis sin treege dankema kaj profunde sin klinis antaŭ la fraŭlino kaj sincere diris: “Do mi povas fari nenion alian ol danki vin

elkore.” Kiam He Wude foriris, li sentis sin ne nur ege pli forta, sed ankaŭ pliigis la kuraĝon al la homa vivo. Origine li jam dronis en malsatego kaj preter forlasi ĉion.

Post dek jaroj virino suferis krizan malsanon kaj ŝi estis en malespera situacio. La lokaj kuracistoj ne sciis kion fari. Familianoj alportis ŝin al granda urbo, por ke specialisto ekzameni al ŝi la raran malsanon. Ili petis, ke la fama doktoro kaj profesoro He Wude persone faru al ŝi diagnozon. Kiam li aŭdis ke la malsanulino venis el lia hejmurbo, liaj okuloj tuj plenis de eksterordinaraj lumradioj. Li tuj kuretis al la malsanula ĉambro de la hospitalo. Kiam li atingis la liton de la malsanulo, li ŝin tuj rekonis. Li decidis fari ĉion per sia tuta koro kaj per ĉiuj siaj fortoj, por savi ŝian vivon. Ekde tiam li ĉiutage speciale observadis la simptomojn de la malsano, konsultis ĉiujn dokumentojn kaj sendis notojn, por peti konsilojn de la kolegoj en la tuta mondo. Post senĉesa penado finfine oni revenigis ŝin al la vivo kaj ŝi venkis la demonon de la malsano. Fine financoficisto alportis al la doktoro He Wude fakturon kaj petis, ke li subskribu ĝin. Li eklegis la fakturon kaj skribis sur la margeno de la fakturo kelkajn vortojn kaj la fakturo estis transdonita al la malsanula ĉambro. Ŝi ne aŭdacis malfermi la fakturon, ĉar ŝi timis, ĉu ŝi kapablos pagi la medikamentojn. Kiam ŝi malfermis la fakturon kaj vidis la vortojn “taso da freŝa lakto jam sufiĉas” kaj la nomon de la doktoro He Wude, ŝi tuj komprenis kaj ŝiaj okuloj tuj ekplenis de larmoj. Ŝi en la koro preĝis: “Dio! Dankon al vi, dankon al vi pro via amo. Vi pere de la koro kaj manoj de ĉiuj homoj senĉese disvastigas la amon.”



# Legu kaj ĝuu

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,  
ul. Kilińskiego 14/3,  
PL-59-300 Lubin,  
Pollando, rete:  
*malgosia.*  
*junaamiko@gmail.com*



## Tutmonda Himno de la Libro de Unesko

**Pri tio, ke ekzistas la titolo “la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro” vi jam scias, ĉar mi tiun informon transdonis al vi pasintjare. Mi nur mallonge memorigos:**

**L**a Ĝenerala Konferenco de Unesko en la jaro 1995 en Parizo proklamis la tagon 23-an de aprilo kiel Mondan Tagon de la Libro kaj Aŭtoraj Rajtoj. Ĉiujare Unesko donas al iu urbo titolon la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro. La titolon oni povas ricevi nur pro la kvalito de sekvaj programoj: evoluo de legado, instigo de la disvastigo de libroj kaj eldoneja industrio. Pasintjare la honoran titolon ricevis la pola urbo Vroclavo, kiu samtempe estis Kulturĉefurbo de Eŭropo.



Kaj nun, bela novaĵo. De ĉi tiu jaro ekzistas ankaŭ la Tutmonda Himno de la Libro de Unesko. Jen ĝia historio:

Pasintjare internaciaj organizaĵoj, ĉiuj urboj kun la titoloj de la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro kaj Kulturĉefurbo de Eŭropo kune kun Unesko subskribis la projekton “La Tutmonda Ĉefurbo de la Libro de Unesko, Vroclavo 2016” por en simpla maniero omaĝi libron kaj kunligi ĉiujn legantojn en la tuta mondo per komuna himno.

La teksto de la himno estas la konata poemo “Haro de poeto” de la konata pola poeto Tadeusz Różewicz. La poemo prezentas gravan rolon kaj forton de la literaturo, samtempe substrekante signifon de la laboro de la poeto. Muzikon al la himno komponis la fama multflanka pola komponisto Jan Kanty Pawluśkiewicz. La himno estis tradukita en kelkdekon da lingvoj.

Sabaton la 22-an de aprilo 2017 je la 12:00 en Vroclavo, en “Arkady Wrocławskie”, kaj samtempe en multaj urboj de la mondo unuafoje oni kantis la Tutmondan Himnon de la Libro de Unesko. En Vroclavo la himnon kantis membroj de la Diskutklubo de Libro, kantistoj, urbanoj kaj invititaj gastoj el tuta Pollando. Tiu antaŭpremiero de la himno estis simbola fino de la jaro, en kiu Vroclavo estis la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro. Tiu bela titolo en la jaro 2017 estis transdonita al Konakrio en Gvineo.



## Klubo de bona libro

**L**a Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo sendu al la supra adreso maldekstre, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

## Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas esceptan libron de Halina Kuropatnicka-Salamon “Kio nova en malnovaj fabeloj (*Co nowego w starych bajkach*)”. Ĉu vi jam supozas, kial ĝi estas escepta?

Ĝi apelacias al niaj plej belaj rememoroj kaj imagoj. Ĝi vekas niajn revojn kaj formas nocion de la bono kaj malbono. Legante la libron vi ekscios kio okazis post ia tempo ĉe herojoj de niaj konataj kaj ŝatataj fabeloj. Ekzemple, la Dormanta Belulino fariĝas pentristino kaj kune kun la edzo loĝas en Vroclavo en Pollando, la naskiĝlando de Esperanto. Pri aliaj herojoj mi nenion skribos, sed mi aldonos, ke en la libro estas sep fabeloj. Jen ili: “La Dormanta Belulino”, “Neĝulino”, “Cindrulino”, „Ruĝkufulineto”, “Mielkukoj de Baba-Jaga”, “Joĉjo kaj Margarenjo” kaj “Domaj koboldetoj”.

La aŭtorino tiel bele priskribis daŭrigon de elektitaj fabeloj, ke legante ilin ni deziras diri: “sidiĝu fabelo apud mi kaj nieniam foriru”.

Halina Kuropatnicka-Salamon estas

emerita instruistino, poetino, prozistino, brajlistino, esperantistino kaj membro de Asocio de Polaj Verkistoj. Ŝi estas tre modesta persono kaj havas multe da pozitiva energio, per kiu ŝi radias ĉirkaŭe. Per sia vivo ŝi provas, ke ekzistas nenia obstaklo por esti feliĉa, aktiva en la vivo, en ĉiu momento de la vivo.

Mi decidis peti Halinan pri intervjueto, por ke ankaŭ aliuloj ekkonu ŝin, kiel belan ekzemplon por imiti.

### Kio kaŭzis, ke vi komencis lerni Esperanton?

Mia renkontiĝo kun Esperanto okazis en malfruinfanaj jaroj. Pri Esperanto mi interesiĝis jam en lastaj klasoj de la baza lernejo. Mi do kreskis kune kun nova interesiĝo. Ĝi atendis de mi diligentan lernadon, kio rezulte montris novajn vojojn, ekzemple korespondadon. Baldaŭ venis vera raviĝo kaj komenciĝis mia aventuro kun pli belaj vivhoroj.

### Kia estas via vivmoto, maksimumo?

Vivi utile por homoj.

### Kiuj estas viaj fortaj kaj malfortaj flankoj? Kio plej multe malstreĉas vin?

Mi estas forta psike, sed timigas min fizika doloro. Por mi, agrablaj estas malfruvesperaj momentoj. Tiam mi solas ĉe varma teo kun trankvilaj pripensoj.


### Kio estas via hobbio? Kian koloron vi pleje ŝatas? Kian floron?

Mi naskiĝis sub stelo de feliĉa vagado. Pasiĝo

mi amas vojaĝojn. Volonte mi ornamas loĝejon violkoloro, sed plej ĉarmas por mi rozkoloraj peonioj.

### Ĉu vi ŝatas legi librojn? Kiajn?

Neimagebla estas realeco sen libroj, precipe historitemaj, sed ankaŭ pentrantaj ĉiutagajn okazaĵojn.



Luiza Carol

## La riza urseto

Iam, en densa arbaro, vivis kvin ĝemelaj geursidoj: tri ursidoj kaj du ursidinoj. Ili estis orfaj, ĉar ilian patrinnon mortigis la ĉasistoj antaŭ kelkaj semajnoj.

**L**a geursidoj amis unuj la aliajn kaj neniam disigiĝis. Unu ursido estis pli forta ol liaj gefratoj kaj pli kuraĝa. Li ĉiam defendis la gefratojn, kiam iu besto provis ataki ilin. Alia ursido kapablis salti pli lerte ol liaj gefratoj, dum alia sukcesis grimpi pli rapide ol la resto. Unu ursidino havis la plej akrajn dentojn, per kiuj ŝi mordis plej efike, dum la alia ursidino fieris pri siaj plej longaj kaj fortaj ungoj, per kiuj ŝi gratis pli forte ol ŝiaj gefratoj.

Foje, unu soleca lupu observis la geursidojn kaj rimarkis, ke neniu granda ursino ĉeestas apud ili por protekti ilin. “Tiuĝ geursidoj ŝajnas al mi orfaj...” – pensis la lupu. “Jen facilaj predoj por mi!” Kaj li tiom ĝojis pri tio, ke li hurlis laŭte kaj longe, tremigante leporojn kaj sciurojn.

“Lupu proksimiĝas!” – diris inter si la geursidoj kaj kvar el ili rapide eniris kaŝejon. Nur la fortulo ne volis kaŝi sin.

Li diris: “Mi estas forta kaj timas neniuon.”

La gefratoj admonis lin: “Ne restu sola! Panjo ĉiam konsilis, ke ni ne separiĝu.”

“Ba! Ŝi ja konsilis tion, kiam ni estis beboj. Intertempe ni multe kreskis. Mi timas neniuon.

### ▶ Kiun libron vi laste tralegis?

Ĵus mi finis la romanon de M. Kalman “Ombrello de Sankta Petro”.

### ▶ Kiun libron vi portus al neloĝata insulo?

En izoleco mi emus legadi ion de Stanisław Lem kaj Antoni Gołubiew.

### ▶ Kio estas por vi amikeco?

Favora sorto pridonacas min per amikeco en diversaj temperoj de mia viv-aĝo. Ĉiu iĝis por mi aparta fajrero de ĉiutaga ĝojo.



Artaĵo de Szűcs Judit, foto: Jozefo Nemeth

Mi kapablas alfronti la lupon kaj forpeli lin.”

Dume la lupu jam alvenis tiom proksime, ke li povis aŭdi ilian babiladon. Li malice ekridis kaj atakis la fanfaroneman ursidon. Sed evidentiĝis, ke tiu ne estis tiom facila predo, kiel la lupu supozis... La fortulo ja luktis bonege, saĝe kaj brave. Krome, la kvar gefratoj tuj eliris el la kaŝejo kaj ekluktis kontraŭ la lupu laŭ siaj kapabloj: la saltemulo saltis sur la dorson de la lupu kaj piedbatis lin, la grimpemulo grimpis sur apudan rokon kaj de tie forjetis pintajn ŝtonetojn al la lupu, la mordemulino enpikis siajn dentojn en la nukon de la lupu kaj la gratemulino vundis la lupon profunde. Fin-fine la lupu apenaŭ eskapis vivanta. Fuĝante, li kriis:

“Malkuraĝulo! Ĉu vi ne hontas lukti kvinope kontraŭ unu sola?! Neniu el vi kuraĝus defii min unuope! Timemuloj!! Timemuloj!! Timemuloj!! Timemuloj!!”

Kiam la lupu troviĝis jam malproksime, la fortulo turnis sin kolere al siaj gefratoj:

“Stultuloj! Kial vi intermiksiĝis? Se mi estus luktinta sola, mi mortigus tiun fiulon, por ke li neniam revenu. Vi nur malhelpis min.”

Multaj disfloris en Esperantujo.

### ▶ Kio vi deziris fariĝi, estinte malgranda knabino?

Mi revis fariĝi instruistino. La sorto permesis atingi ĉi tiun profesion, kiu feliĉigis min multfoje.

### ▶ Dankon Halina pro viaj respondoj.

Mi aldonu vortojn de Luis Serrano Pérez, kiu skribis: “Ĉar juveloj, kiel ŝi, ne abundas en ĉi tiu mondo.”



Tiel li grumblis, dum la gefratoj provis trankviligi lin. Malkontenta kaj kolera, la fortulo perĉis la lupon dum la somero kaj la aŭtuno, por alfronti lin sola. Li promenis tra la arbaro kantante:

“Mi timas neniam; mi timas nenium. Se lup’ revenos iam; mi mortigos lin.”

Ĉiuj bestoj en la arbaro aŭdis la kanteton kaj certe ankaŭ la lupo aŭdis ĝin, sed li prudente kaŝiĝis ĝis sia resaniĝo.

La gefratoj de la fortulo ofte rememorigis al li: “Panjo diradis: ‘Ne veku malfeliĉon, kiam ĝi dormas... Ne voku diablon, ĉar li povas aperi...’”

Tamen la fortulo ignoris ilin kaj daŭre fanfaronadis.

Somero pasis, aŭtuno pasis kaj la vetero fariĝis tre malvarma. La kvin geursidoj fariĝis pli kaj pli dormemaj, samkiel okazas al ĉiuj ursoj fine de aŭtuno. Ili reiris al la larĝa groto, kie ili naskiĝis, malantaŭ maljuna arbo. Tien ili eniris kaj kovris per ŝtonetoj la enirejon. La fanfaroneman fortulon oni apenaŭ konvinkis eniri la groton.

“Mi ne pritimas malvarmon, nek bezonas ripozon” – li diradis. “Tamen, ankaŭ mi eniros la groton, nur por zorgi pri vi ĉiuj dum la vintro. Sed mi kuŝos ĝuste apud la enirejo, por protekti vin, se iu danĝero okazos.”

En la groto troviĝis mola tapiŝo el musko. La vintra vento apenaŭ aŭdiĝis tie. La geursidoj endormiĝis unu post la alia, krom la maltrankvila fortulo. Tiu restis kun malfermitaj okuloj kaj streĉitaj oreloj. Foj-foje ŝajnis al li, ke li aŭdas la hurladon de la lupo, kiu alvokas lin por lukti unu kontraŭ la alia. Li aŭskultis atente, atente... lia koro ekbatis rapide... sed ne, nur la malvarma vento hurlis tra la arboj. Eble la fortulo iom dormetis... Eble li nur sonĝis... Post kelka tempo la vento ĉesis blovi. Subite li aŭdis la lupan hurladon. Ĉu? Aŭ eble li denove trompiĝas? Ne eblas. Ĉi-foje li aŭdis la lupon.

Silente, la ursido eliris el la groto, dum liaj gefratoj profunde dormis. La subitaj lumoj kaj malvarmo igis lin ŝanceliĝi. Li blokis la enirejon malantaŭ si kaj enspiris profunde.

“Kiom belas la neĝo! Kiom brilanta fariĝis la arbaro! Domaĝe, ke miaj gefratoj dormas stulte kaj vidas nenion...” – li pensis.

Li marŝis silente tra la neĝo, ĝis li glitis kaj falis. Lia malantaŭa maldekstra kruro

kontuziĝis iom, sed li opiniis, ke tio estas bagatelo. La beleco de la blanka arbaro fascinis lin tiom, ke li apenaŭ sentis la froston, kiun akriĝis. Li eĉ ne rimarkis, ke li delonge troviĝis en iu parto de la arbaro, kiun li neniam esploris antaŭe.

Post kelka tempo, subite, li sentis fortegan doloron en la malantaŭa kruro. Li komencis lami. Li oscedis ĉiupaŝe. Li jam sentis timon, dolorigan frostigan timon. Li pensis:

“Miaj gefratoj pravus. Ili amas min, kaj mi estis tiom maldankema... Mi pardonpetos kiam mi revenos... Sed kiam mi revenos?... Kiel mi revenos?... Ĉu mi revenos?..”

Ho, kiom malforta fariĝis la fortulo...!

“Huuuu!” – hurlis la lupo de tre proksime, kaj ĝuste tiam la ursido stumblis kaj glitis laŭ malgranda deklivo. Li falis ĝuste sur sian kontuzitan kruron kaj ne plu kapablis leviĝi. Je sia dekstra flanko, subite li vidis la lupon sur la rando de la deklivo.

“Baŭ- ŭaŭ” – li aŭdis de sia maldekstra flanko. Tie ĝuste aperis granda hundo.

Senmoviĝis la ursido kaj eĉ liaj pensoj frostiĝis.

“Bumm!” – pafis fusilo de tre proksime.

\*\*\*

La ursido vekigi en nekonata stranga loko. Kvin gekoboldoj rigardis lin zorgoplene.

“Ĉu mi mortis?” – demandis la ursido.

“Ne. Vi nur svenis. Ĉio bonordos...” – respondis ridetante la plej malalta koboldo, turnante ringon kun ruĝa ŝtoneto ĉirkaŭ la dikfingro de sia maldekstra mano.

Kaj iom post iom, per la helpo de la gekoboldoj, la ursido komprenis, kio okazis al li.

Li troviĝis nun en belega ligna domo, kiu apartenis al kvin gekoboldoj. Kune kun tiuj loĝis ankaŭ Fidelo, brava hundo, kies ĉefa tasko estis forpeli danĝerajn bestojn, proksimiĝantajn al la domo. Antaŭ kelkaj horoj, en la arbaro, kiam Fidelo laŭte bojis, la koboldoj eliris kaj unu el ili pafis en la aeron, por fortimigi la lupon. Tiu forkuris, sed Fidelo restis surloke kaj daŭre bojis, ĝis la gekoboldoj alvenis kaj trovis la svenintan ursidon. Ili prenis tiun en sian domon kaj ekflegis lin.

La gekoboldoj estis kvin gefratoj, kiuj heredis de sia patrino po unu magian ringon.





Fabelo

Ili loĝis kune, ĉar ju pli proksime troviĝis iliaj ringoj, des pli efikaj tiuj estis. Sed la potenco de la ringoj dependis precipe de la amo kun kiu oni uzis ilin. Ju pli da sincera amo inspiris la dezirojn de la koboldoj, des pli bone la ringoj funkciis, por helpi la plenumon de tiuj deziroj.

La gekoboldoj estis bonhumoraj kaj ege ŝercemaj, sed iliaj ŝercoj neniam fariĝis kruelaj, ĉar iliaj koroj estis tre bonaj. Fidelo similis al siaj mastroj, koncerne ŝercemon kaj bonkorecon.

La plej aĝa kaj saĝa koboldo estis kuracisto. Li estis ĝuste la malaltulo kun ruĝ-ŝtoneta ringo. Li preparis ŝmirajon por la kontuzoj de la ursido kaj vindis ties maldekstran kruron. Li ankaŭ preparis kuracigan teon por la paciento kaj rekomendis al tiu manĝi kiel eble plej multe da rizo kaj mielon Ne malagrabla dieto, ĉu ne?

La dua frato estis ĉarpentisto. Li estis tre diligenta koboldo, kiu havis bluŝtonetan ringon sur la montrovingro de la maldekstra mano. La ligna domo kaj la tuta bela meblaro ene de ĝi estis liaj kreaĵoj. Helpata de sia ringo, la ĉarpentisto konstruis por la ursido novan dormoĉambron kaj belan liton.

Kudristo fariĝis la tria frato. Tiu estis iom pli alta ol la aliaj, kaj sur la mezvingro de lia maldekstra mano brilis flav-ŝtoneta ringo. Ĉiuj vestaĵoj de la gekoboldoj, ĉiuj tapiŝoj, kurtenoj, littukoj, bantukoj kaj tablotukoj en la domo estis liaj kreaĵoj. Por la ursido la kudristo faris novajn matracon kaj kusenon, blankajn littukojn kaj blankan litkovrilon, sur kiu li brodis ruĝan koron.

La kvara en la vico estis belega koboldino, kun verdaj okuloj kaj verd-ŝtoneta ringo sur la ringofingro de la maldekstra mano. Ŝi estis ĝardenistino kaj zorgis pri la ĝardeno apud la domo. Ŝi scipovis kreskigi en nur kelkaj horoj ajnajn plantojn en ajna sezono, sendepende de la vetero. Krome, ŝi scipovis kreskigi belajn bonodorajn florojn kaj prepari mielon, uzante robotajn abelojn. Malpezaj kiel neĝeroj estis tiuj mirindaj robotetoj. Ili pikis nenium, ne timis malbonan veteron kaj tute ne bezonis ripozi dum la vintro. Ili estis miloble pli rapidaj ol la veraj abeloj kaj demetis mielon rekte en la potojn. Kiam ili ne estis bezonataj, la bela ĝardenistino metis ilin en lignan

skatolon, kvazaŭ ili estus juveloj. Por la ursido la ĝardenistino preparis mielon el sunfloroj kaj bongustegan rizon.

La plej juna el la gefratoj estis la plej talenta. Ŝi estis la kuiristino, la delikata gracia koboldino, kiu portis sur la etfingro de la maldekstra mano etan ringon kun viol-kolora ŝtoneto. La kuiristino donacis al la ursido iun grandan vitran ortangulan ujon por manĝi. Ŝi plenigis tiun ujon 5-foje tage per la plej bongustaj kaj sanigaj manĝaĵoj, laŭ la ekzakta rekomendo de la kuracisto.

Tiel la ursido rapide resaniĝis en la domo de la gekoboldoj kaj post nur kelkaj tagoj ekdormis tre profunde, tiom profunde kiel nur ursoj kapablas ekdormi.

Post kelka tempo, en la groto, la kvar ursidoj vekiĝis kaj rimarkis la malĉeeston de la fortulo. Ili ege maltrankviliĝis kaj eliris por serĉi sian fraton. Sed ili vokis lin vane.

Fronte de la groto troviĝis maljuna arbo, en kies branĉoj loĝis strigino. Tiu kutimis dormi dum la tago kaj ĉasi dum la nokto. La bruo de la gefratoj vekis ŝin kaj ŝi alparolis la kvaropon:

“Ne plu bruu ursidoj, ĉar la lupu povus aŭdi vin. Mi ja scias, kie estas via frato, ĉar dum la nokto mi kutimas flugi ĝis tre malproksimaj lokoj kaj miaj okuloj kapablas vidi bonege tra mallumo. Sed... se vi volas novaĵojn pri via frato, mi petas rekompencon.”

“Kion vi volas?” – ekkriis la ursidoj.

“Mi volas ke vi promesu, neniam plu skui mian arbon kaj neniam plu ĝeni min dum la tagoj. Se ni estas najbaroj, indas ke ni respektu unuj la aliajn, ĉu ne?”

“Jes, jes, jes...” – konsentis la ursidoj korus.

Kaj la strigino rakontis: “Mi vidis vian fraton en la domo de la kvin koboldoj, en la orienta parto de la arbaro. Tra la fenestro mi rigardis kaj vidis lin dormantan, kovritan per blanka litkovrilo sur kiu ruĝa koro estas brodita. Sub la kapo li havis blankan kusenon. Pli multon mi ne scias...”

“Koran dankon, najbarino!” – diris la geursidoj kaj reiris en la groton pli trankvilaj.

Sed, nevidata, la soleca lupu troviĝis ĝuste apude, kiam la strigino parolis kun la ursidoj. Kaj en lia menso maturiĝis ruza plano. Li kuris al la domo de la koboldoj kaj alparolis



la bravan Fidelo. La lupo diris, ke, laŭ onidiroj, la gekoboldoj planas anstataŭigi la hundon per la ursido, kiam tiu kreskos kaj fariĝos eĉ pli forta.

“Mi aŭdis, ke ĉiunokte, dum vi fidele gardas la domon, la ursido ripozas sur matraco kun kuseno kaj kovras sin per blanka litkovrilo kun brodita ruĝa koro... Certe la gekoboldoj jam amas lin pli ol vin...”

Sed Fidelo bone sciis, ke ursoj nepre bezonas longegan profundan dormon dum la vintro, kaj la koboldoj planas gastigi la ursidon nur ĝis printempo. Tamen, ĉar li estis tre ŝercema hundo, venis en lian kapon amuza ideo, por distri sin kaj siajn mastrojn. Tial li ŝajnis konsenton, dankis la lupon pro ties konsiloj kaj fin-fine eĉ ŝajnis sin preta helpi la lupon manĝi la ursidon. Fidelo diris ruze:

“La forta ursido ĵus vekigis por manĝi kaj trinki. Kiam li ne dormas, li estas ege danĝera. Sed vespere li iros en la ilarejon por dormi.”

“Kial ĝuste tien?”

“Ĉar lia felo densiĝis kaj en la domo estas jam tro varme por li. Mi atendos ĝis li ekdormos profunde, poste mi malfermos la pordon de la ilarejo kaj alvokos vin. Sed atentu: la gekoboldoj sorĉis la ursidon. Se vi ne englutis lin tutece kaj fulmrapide, se unu sola peceto el li restos nemanĝita, el tiu peceto elkreskos denove la ursido kaj dufoje pli granda kaj forta li fariĝos. Kaj post kiam vi formanĝos lin, ne forgesu mordi la liton forte kaj rapide, ĉar ankaŭ la lito estas sorĉita. Se vi ne rompos ĝin per viaj dentoj, tiu lito kapablas revivigi la ursidon pere de ties fortaodoro...”

La lupo aŭskultis atente, por plenumi ĉiujn konsilojn.

En la domo la gekoboldoj amuziĝis pri la plano de Fidelo kaj hastis plenumi la ŝercon. Ili faris paston el rizo kun soja saŭco kaj muldis el ĝi urseton, kiun ili metis en la grandan vitran ujon de la dormanta ursido. La odoro de ties buŝo ankoraŭ sentiĝis en la ujo. El pecetoj de nigraj olivoj, la gekoboldoj faris la okulojn kaj la nazon de la riza urseto. Sub lian kapon ili metis pecon da tofuo, tiel ke ĝi similis blankan kusenon. Ili kovris la rizan urseton per blanka tofua kovrilo, kiun ili ornamis per ruĝa koro el tomat

saŭco. Poste ili deprenis la littukon de sub la dormanta ursido kaj anstataŭigis ĝin. Kiam noktiĝis kaj neniu povis vidi ilin, la gekoboldoj eniris la ilarejon kaj metis sur la plankon la blankan littukon de la ursido, ankoraŭ konservantan la odoron de ties korpo. Sur la littukon ili metis la ortangulan ujon kun la riza urseto kaj tuj eliris, lasante la pordon malfermita.

Ĉio okazis glate, kiel Fidelo planis. La lupo alvenis kaj tuj flaris ursan odoron. En la pala luna lumo li kredis vidi la ursidon kaj fulmrapide englutis la rizan manĝaĵon tutece, eĉ ne havante tempon senti, ĉu ĝi bongustas. Li ne vidis ajnan liton, sed memfide mordis la vitran ujon, kiu frakasiĝis kaj vundis lian buŝon. Veante, la lupo forkuris rapide, dum Fidelo kaj la gekoboldoj amuzis sin. Ili vere amis la ursidon kaj esperis, ke post tiu aventuro la lupo ne plu kuraĝos ataki lin.

Denove kaŝiĝis la lupu dum longa tempo, atendante ke lia buŝo resaniĝu.

“Tiu lito ja estis pli sorĉita ol mi supozis... Mi eĉ ne kapablis vidi ĝin... – li pensis. Tamen ĉi-foje li estis tre fiera pri si mem. Li kredis, ke li jam englutis la ursidon, kaj tiu penso estis por li tiom agrabla, ke la vundo jam ŝajnis bagatelo. Li ankaŭ fieris pri tio, ke li sukcesis definitive detruiri la sorĉitan nevideblan liton. Ho, neniam antaŭe havis la lupu tiom grandan estimon por si mem...”

\*\*\*

Printempe la soleca lupu eliris el la kaŝejo sana kaj feliĉa. Li saltis kaj fajfis kaj kantis ĝojplene: “Mi estas la plej forta, l'ursido estas morta! Mi estas la plej forta, l'ursido estas mor...”

Subite li preskaŭ koliziis kun... la ursido! Tiu bonege kreskis kaj fortiĝis dum la vintro. Li jam aspektis kiel timigege juna urso, staranta sur la malantaŭaj piedoj. Apud li aperis liaj gefratoj. Ankaŭ ili kreskis kaj maturiĝis. Tra la menso de la lupu fulmis la penso:

“Mi verŝajne neglektis engluti iun peceton...”

La lupu turnis sin kaj forfuĝis... tra la tuta arbaro, tra la apuda paŝtejo, tra alia arbaro, tra alia paŝtejo... Eble li daŭre fuĝas kaj fuĝas...

# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, [malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie...  
Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi  
helpas vidi kaj krei alimaniere  
la mondon, ebligas revii aŭ  
transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj rememorigas kanto-vortojn. Tiunmaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj; do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi proponas ĉi-foje kune ekkanti la kanton "la gaja migranto". La vortojn skribis la germana poeto Joseph von Eichendorff kaj esperantigis ilin Ludoviko Zamenhof. La muzikon komponis Theodor Fröhlich. La kanton por la legantoj de *Juna Amiko* elektis la fama vroclava esperantisto Edward Eduło Wojtakowski.

Joseph von Eichendorff estis germana poeto, unu el la plej famaj reprezentantoj de germana romantikismo. En sia verkaro li montris la kontraston inter la reala mondo kaj la sopirita fabeleca mondo. Liaj multaj lirikaĵoj fariĝis kvazaŭ popolkantoj kaj muzikon al ili komponis ankaŭ famaj komponistoj, ekz. Robert Schumann.

Elektita de Eduło Wojtakowski, la kanto troviĝas en *Fundamenta Krestomatio* (p. 332) kaj ankaŭ en *Esperantista Kantaro* (1907). Oni fondis ankaŭ Literaturan Premion de Joseph von Eichendorff.

## La gaja migranto

*Se donas Di' al vi favoron,  
Li sendas vin for el la dom',  
Por montri sian mirlaboron,  
La belan mondon al la hom'.*

*De l' montoj riveretoj fluas,  
Alaŭdoj kantas super mi,  
Mi ankaŭ gajan kanton bruas  
Al la tutmonda harmoni'.*

*Al Dio fidas mi kun ĝojo,  
Li zorgas pri la tuta ter',  
Li ankaŭ min sur mia vojo  
Eterne gardos de l' danĝer'.*







C F C

Se do- nas Di' al vi fa- vo- ron, Li

Dm7 C G

sen- das vin for el la dom', Por

G7 C F C

mon- tri si- an mir- la- bo- ron, La

Am C/G G7 C

be- lan mon- don al la hom'.

5. Kiu ĝin aljuĝas?
6. Kiel ĝi aspektas?
7. Ĉu la kanton "La gaja migranto" esperantigis nur Ludoviko Zamenhof?
8. Detaligu almenaŭ tri liajn famajn verkojn.

Viajn respondojn interrete sendu al mi por ricevi valorajn premiojn, kiujn fondis la pola organizaĵo Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

### KANTU kaj LERNU

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.

[La foto maldekstre sube montras la monumenton de Joseph von Eichendorff en Vroclavo, en la botanika ĝardeno.]

### Bonvolu respondi jenajn demandojn:

1. Kiam kaj kie naskiĝis la poeto?
2. Kiam kaj kie li mortis?
3. Kie li studis?
4. En kiu jaro oni fondis la Literaturan Premion de Joseph von Eichendorff?

## Tramo

*Malhelas noktaj lampoj,  
singarde musoj gratas,  
kaj sonĝas laca tramo  
pri malproksima land':  
pri floroj en herbaro,  
pri birdoj en arbaro,  
pri ondobra ŝtormo  
al strand'.*

*Ĉi tiun traman landon  
tramaro saĝe regas,  
ĉar ĉiu estas tramo:  
pentristo, profesor',  
paŝtisto estas tramo,  
vendisto estas tramo,  
kaj tramo trame tramas  
al labor'.*



esperanta retradio

*Se povus mi konvinki  
la relojn ferodorsajn,  
ke lasu ni ĉi-urbon  
kaj tuj veturu for...  
Sed reloj kurbiĝemaj,  
timeme obeemaj,  
balbutas pri sinjoro  
semafor'...*

La kanton, kiun verkis kaj produktis Alexander Kerbel el Israelo, eblas aŭskulti sub <http://esperantaretradio.blogspot.sk/> (13 jan 2017)

resp. <http://vocaroo.com/il/s0dk4hiQBF35>.

Vidu ankaŭ <http://esperantaretradio.blogspot.sk/?view=magazine>



Rubrikestro:  
Elena Nadikova,  
Esperanto-klubo "Betuleto"  
Lernejo/Ŝkola 56,  
pr. Traktorostroitelej, 38  
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio  
[lana\\_espero@mail.ru](mailto:lana_espero@mail.ru)



# Nia Unua Lernolibro de la lingvo

## Saluton, karaj legantoj!

Verŝajne vi jam aŭdis, ke pasint-somere dum Universala Kongreso de Esperanto en Nitra, Slovakio, UEA anoncis la jaron 2016-2017 kiel Jaro de Lernanto (JdL). Per tiu iniciato oni celas altiri atenton de la vasta komunumo al jenaj demandoj: Kiel ŝanĝiĝis lernado en la nuna mondo? Kiun rolon akiris lernanto en moderna pedagogio danke al diversaj teknikiloj kaj Interreto? Kiuj interesaj metodikoj aperis en la didaktiko danke al novaj teknologioj?

**K**adre de JdL estis planitaj kaj realigataj diversaj iniciatoj, eventoj kaj aranĝoj. En Interkultura Mondo ni prezentas al vi ĉi-foje unikan ekspozicion, kiu bone kongruas kun la Jaro de Lernanto.


Temas pri la iniciato de niaj samideanoj el Japanio el la urbo Jokohamo. La esperantistoj el la Lando de Leviĝanta Suno jam estas konataj tra la mondo pro siaj interkulturaj eventoj. Vi certe memoras, karaj legantoj, pri la Monda Pupekspozicio, kiun oni organizas en la urbo Higashikagawa ekde 2011 (vidu la numeron 140 – 2/2014). Aŭ pri la ĉiujara ekspozicio de mesaĝoj el la tuta mondo,





dediĉitaj al la Internacia Virina Tago. Ĝin japanaj esperantistoj organizas en la urbo Hiroŝimo.

Ĉi-foje ni rakontos pri la ekspozicio “Nia Unua Lernolibro de la lingvo”. Ĝi estis organizita en la urbo Jokohamo en la kunveno de la lokaj esperantistoj Kanagawa Kenmin Sentaa. Jam dum tri jaroj tie niaj samideanoj okazigas fotoekspozicion pri internaciaj agadoj per Esperanto. Ĝi rakontas al siaj gastoj pri diversaj aktivecoj en Esperantujo. La 3-a fotoekspozicio en aŭgusto 2016 prezentis al la vizitintoj la 101-an Universalan Kongreson de Esperanto en Nitra (Slovakio) per grandaj A1-formataj fotoj, historion de Esperanto en la mondo ĝenerale kaj en Japanio kaj Jokohamo. La gastoj



povis spekti ankaŭ la esperantlingvajn tradukajojn de la monda literaturo.

La signifa parto de la ekspozicio estis dediĉita al la unuaj lernolibroj el diversaj landoj, per kiuj la plej junaj lernantoj – unuaklasanoj – lernas sian denaskan lingvon. Do, temas pri “ABC-libroj.” Ili sendube estas tre gravaj en lernado de malgrandaj infanoj. Fakte ABC-libroj estas vere la unuaj lernolibroj en la vivo de ĉiuj homoj, almenaŭ oficiale. Kutime oni produktas ilin bele ornamitajn kaj ilustritajn. Ili povas interesiĝi ankaŭ pri la metodikoj, laŭ kiuj oni instruas la denaskan lingvon al infanoj.

Por kolekti tiujn librojn jokohamaj esperantistoj aprile 2016 alvokis la tutmondan esperantistaron pri la kontribuo. Multaj niaj samideanoj respondis al la peto. Danke al ilia helpo en la ekspozicio estis prezentitaj 28 lernolibroj el 18 landoj aŭ regionoj. Jen estas ili laŭ la mondopartoj:



**Azio** – el Koreio (la korea lingvo); el Ĉinio kaj Tajvano (la ĉina); el Mongolio (la mongola); el Vjetnamio (la vjetnama); el Hindio (Barato – la bengala); el Taĝikio (la taĝika);

**Eŭropo** – el Germanio (la germana); el Rusio (la rusa kaj la ĉuvaŝa – el Ĉuvaŝa Respubliko); el Rumanio (la rumana); el Kroatio (la kroata); el Ĉeĥio (la ĉeĥa); el Slovakio (la slovaka);

**Afriko** – el Konga Demokratia Respubliko (la svahila);

**Ameriko** – el Meksiko (la hispana), el Ĉilio (la hispana);

**Aŭstralio** (la angla).

Vizitis tiun interesan ekspozicion entute 152 gastoj “eksteraj” kaj, kompreneble, la anoj de NPO Esperanto Jokohama (Hama-Rondo). Bona kvanto, des pli ke la ekspozicio okazis dum labortagoj. Krome, dum la unua tago de la aranĝo la urbon atakis tajfuno, kio ankaŭ malfaciligis vizitadon. Tamen jam tiuj 152 homoj konatiĝis kun la ekspozicio kaj konvinkiĝis, ke Esperanto estas ne nur vivanta, sed ankaŭ “aganta” lingvo.

Ĉi-jare jokohamaj esperantistoj planas denove organizi la ekspozicion pri la unua lernolibro. Aprile ili dissendis la novan alvokon al la mondaj samideanoj. Interkultura Mondo tutanime gratulas niajn amikojn el Jokohamo pro ilia poresperanta agado kaj deziras pliajn sukcesojn! Kaj ni alvokas al ĉiuj esperantistoj apogi niajn samideanojn kaj helpi al ilia iniciato. Ja ju pli multe da eventoj okazos danke al Esperanto, des pli evidenta estos viveco de nia internacia lingvo!

Por tiuj, kiuj volas kontribui al la ekspozicio de japanaj amikoj: la lernolibro atingu la organizantojn ĝis la fino de julio al la sekva adreso: NPO Esperanto Jokohama, Nisisiba 4-17-9, Kanazawa-ku, Yokohama-si, Japanio (JP-236-0017).

Nia rubriko esprimas koran dankon al s-ino Doi Ĉieko pro la disponigitaj materialoj.

Luiza Carol:

## Kluba agado pere de *Juna Amiko*



La 20-an de februaro 2017 en la Tel-Aviva klubo Josi Ŝemer\* okazis originala agado.

**L**a israela esperantistino Lea Kudevicki organizis pupspektakleton, uzante la teatraĵon “Zorgoj pri vestaĵoj” de Judit Felszeghy, el *Juna Amiko* 2016/4.

En la foto videblas la drampersonoj. De maldekstre: la vendisto, Oskaro, Elinja antaŭ la aĉetado, Elinja post la aĉetado (la pupistino igis ŝin ŝanĝi ankaŭ la koloron de la hararo).

*\*) Josi Ŝemer (Josef Schemer, 1950-2012) estis juda israela esperantisto. En 2001-2008 li estis prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo kaj poste ĝis sia morto ĝia sekretario kaj kasisto. Li redaktis la gazeton Israela Esperantisto. En la Loka Kongresa Komitato de la 85-a UK en Tel-Avivo li funkciis kiel sekretario. En Tel-Avivo li gvidis la lokan Esperanto-klubon kaj ĝiajn mardajn kunvenojn. Li famiĝis ankaŭ pro judaj anekdotoj.*



Raita Pyhälä

# Arto el Bronza Epoko

En kelkcent lokoj en Skandinavio troviĝas sur rokoj gravuraĵoj de niaj prauloj.

**E**n Finnlando ili kutime troviĝas sur vertikalaj rokmuroj apud lago aŭ rivero. Homoj ne facile rimarkas ilin, ĉar la suno, pluvo, glacio kaj vento erodis ilin dum miloj da jaroj. La gravuraĵoj en la fotoj troviĝas en Tanum, Svedio, sur iom konveksaj rokoj subĉielaj, proksime al sudokcidenta norvega limo. Esploristoj aldonis koloron en la gravuraĵojn, por igi ilin pli facile videblaj. La sciencistoj ne scias, ĉu ili iam estis farbitaj aŭ ne.



Sciencistoj ne kuraĝas decidi kaj samopinii, ĉu la bildoj reprezentas boatojn, sledojn aŭ kion. Same pri la bestoj: ĉu ili estas ĉevaloj, alkoj, cervoj, boacoj aŭ kio?

Oni ankaŭ demandas sin, kial la artistoj faris tiajn bildojn. Ĉu por rakonti pri io, kio okazis, aŭ ĉu por per magio kapti ĉasaĵojn aŭ danki siajn diojn.

Ĉu la ronda desegnaĵo sur la maldekstra foto montras dancon, floron aŭ sunon?

Kion vi opinias?

Provu trovi ankaŭ vi ion pri tiaj artaĵoj. En kiu lingvo vi trovas ilin?





Raita Pyhälä:

# Bastonĉevaloj

En deko da jaroj dekobliĝis la nombro de bastonĉevalistoj en Finnlando. Ekde la jaro 2012 ĉiujare okazas ĉampionludoj pri obstaklorajdado kaj rajdarto.



**L**a biletoj al tio rapide elĉerpiĝas. Ĉar ĉio tio estas volontula kaj nekomerca, la etoso estas amika kaj kuraĝiga. En jutubo, instagramo kaj fejsbuko aperas fotoj kaj intermesaĝoj. Pri la nova hobbio jam aperigis artikolojn brita kaj usona gazetoj. En kinejoj oni povas vidi dokumenton Bastonĉevala ribelo (angle *Hobbyhorse revolution*). La hobbio kunigas geknabojn kaj gejunulojn en volontula

trejnado kaj trejniĝo, en la arto mem kudri, remburi kaj ornamati sian ĉevalon. Tio interkonatigas nekonatojn pere de la socia medio, kreas inter ili amikajn rilatojn kaj pozitivajn sentojn.

La unua bastonĉevalistino komence estis primokata kaj eĉ ĉikanata. Nun la bastonĉevalistoj kunvenas en parkoj, hejmaj kortoj kaj okazigas por si tendarojn. Ili povas aĉeti kaj vendi siajn memfaritajn ĉevalojn en la reto. Ĉiu ĉevalo havas nomon, vivhistorion, karakteron. Ĉiu rajdisto same. La gamboj de la rajdistoj laboras kiel la gamboj de vera konkursĉevalo kaj la supra parto de la korpo devas resti kiel eble plej senmova. Tio postulas muskolan forton, balancon kaj grandan atenton, imagpovon. Certe bastonĉevalo estas malplikosta ol poneo kaj neniam malpurigas sian stalon.





Mireille Grosjean:

# Rakonto pri tarofolioj

**Jen interesa rakonto, verkita kaj ilustrita de afrikanoj, prenita el la sannoma lernolibro.**

**I**am estis vilaĝo nomata *Obikrom*, kies tabuo estis *kotomere* aŭ tarofolio.

En tiu vilaĝo vivis feliĉe gesinjoroj Akum kaj Fatou, ĝis iam malsaniĝis ilia filino Mami. Ŝi ege suferadis kaj maldikiĝis. Bedaŭrinde, pro manko de mono, la paro ne povis sendi sian filineton al apudurba malsanulejo.

Tagon post tago la suferoj de la filineto multoblis kaj Panjo Fatou maltrankviliĝis pli, ĉar ŝi ne sciis, de kiu ŝi iam kaj ie povus havi savhelpon. Bonŝance iam iu maljunulo el malproksima regiono alvenis al Obikrom. Li iris al la dometo de gesinjoroj Akum por peti gastigadon. La paro havis nur unu ĉambron; tial la edzo alvokis sian edzinon endomen kaj proponis diri al la maljunulo, ke ili ne povas gastigi lin. Lia edzino insistis por akcepti lin, esperante lian helpon. La edzo protestis energie, kaj tiam per malforta voĉo la knabino petegis ilin bonvenigi la gaston. La patro eliris el la dometo kaj ridete li invitis la maljunulon eniri ilian malgrandan domon. Vidinte la knabon, li demandis pri ŝia sano kaj la gepatroj raportis, ke ŝi suferis pro anemio.

La maljunulo prenis kelkajn larĝajn verdajn foliojn el sia sako kaj demandis la paron, ĉu ili konas tiun planton. Post ilia negativa respondo li donis la nomon mallaute. Tiuj ĉi folioj estas tarofolioj.

Tuj la edzo koleriĝis kaj petis la gaston eliri ilian domon kun tiuj tabuaj folioj. Fatou, la edzino, estis tre prepleksa, ĉar pro la bonfarto de sia filino ŝi volis

ofendi nek la gaston, nek la edzon. Ŝi proponis al sia edzo aŭskulti almenaŭ la gaston antaŭ ol kontraŭstari lin. La maljunulo konsciis pri tiu problemo, sed estis la sola rimedo por savi la knabineton. La maljunulo petis ilin akcepti, malgraŭ la granda tabuo, kiu ekzistis en la vilaĝo, ĉar li havis absolutan certecon, ke antaŭ sunsubiro la knabineto estus mortinta. Fatou pretis malobei kaj provi ion ajn por savi sian filinon. Tiu



lasta aŭskultis ŝian peton kaj anoncis, ke ŝiaj fortoj malaperos. Paĉjo Akum konsentis preni la tarofoliojn kaj Fatou preparis bonan saŭcon; per ĝi ŝi trinkigis sian filineton. Mami rapide reakiris siajn fortojn kaj resaniĝis. La informo disvastiĝis en la tuta vilaĝo kiel tondro, ĝi vojaĝis ĝis la reĝa kortego tiel, ke la reĝo devis venigi tiun eksterordinaran gaston al la reĝa kortego kaj demandis lin riveli la sekreton de la grandpovaj folioj de resanigo "taro" kaj la feliĉa gasto, savanto, klarigis, ke tarofolioj enhavas riĉecon de provit amino A.

La reĝo decidis solene nuligi la prapatran tabuon koncerne tarofoliojn kaj ekde tiam ĉiuj loĝantoj en la vilaĝo de Obikrom manĝas tarofoliojn.





Mireille Grosjean

# Kiom stultan penson mi havis!

En Svislando estas stratoj kaj trajnlinioj. Ĉar estas multaj montoj, inĝenieroj devis konstrui pontojn kaj tunelojn.

**E**kde 2016 situas en Svislando la plej longa tunelo en la mondo: Gotardo (Gotthard, 57 km, rim. de la red.).

Se vi vojaĝas tra Svislando, vi devas ofte veturi tra tunelo, ĉu en aŭto ĉu en trajno.

En Afriko vivas etno, eble etnoj, kiuj kredas, ke la mortintoj kuŝas en la tero. Oni devas ne ĝeni ilin, ne iri tien, ne fari bruon. Unu tia afrikano vojaĝis tra Svislando kaj okaze de veturado tra tunelo li parolis al la mortintoj kaj petis pardonon: "Ne koleru! Mi ne ĝenos vin longe.... Restu kviete tie".

Tio ekzistas. Mi scias pri tio.

Antaŭ kelkaj monatoj mi entrajniĝis. Sekvis min afrikano. Li estis sola, sed li flustris daŭre. "Bla bla... ŝ... ŝ... lo... lo... mu... mu.", mallaŭte. Tuj mi pensis pri la alia afrikano, kiu alparolis la mortintojn



en la svisaj tuneloj. Mi pensis: "Jen unu, kiu alparolas la mortintojn." Aliaj kutimoj....

Subite mi vidis, ke fakte li uzis etetajn aŭskultilojn kaj li estis – telefonanta...!







Jose de J Campos Pacheco

# Serpentoj

Serpentoj estas reptilioj kun longaj, senkruraj korpoj, kiuj rampas kiel vermoj laŭ rimarkinda maniero. Ili ĉasas ĉiuspecajn bestojn kaj kapablas engluti ilin en unu peco, ĉar iliaj makzeloj estas nefiksitaj.

**U**nu el la plej grandaj serpentoj estas la malajzia pitono de la Fora Oriento. Ĝi povas kreski ĝis longeco de 9 metroj. Ĉi tiu giganto nomiĝas konstriktoro, ĉar ĝi premmortigas sian viktimon per ĉirkaŭvolvado.



**Boao**, de Sud- Ameriko, estas malpli granda, kutime ne pli longa ol 4 metroj. Venenaj serpentoj, kiel viperoj kaj najoj, mortigas siajn viktimojn per mordo, t.e per specialaj pikdentoj, kiuj enŝprucas venenon.



Neniu serpento pikas per sia lango. **Herba kolubro** vivas en Eŭropo. Ĝi loĝas sur heĝoj kaj ĉasas bestetojn.



La viperoj de Norda Ameriko nomiĝas “sonserpentoj”. La kialo evidentiĝas.



Jen la **diamanta krotalo**, kiu funkciigas sian klakilon por averti malamikon.



**Mara serpento** troveblas en la Fora Oriento. Ĝi estas venena, kaj utiligas la platforman voston por naĝi en la maro.






Olivier Buisson:

# Strigo de Dijono

En Dijono, Francio, sur la preĝejo Notre-Dame, estas skulptita birdo, kiun la diĵonanoj nomas “la strigo”. Ĝia signifo estas nekonata.

**L**a strigo estas tre eluzita pro superstiĉa praktiko, kiun ĝi estigas: diĵonanoj kaj turistoj kutimas karesi ĝin per la maldekstra mano, esperante, ke ilia deziro estos elaŭdita. Restas hodiaŭ nur la ĝenerala formo, la plimulto de la detaloj de la skulptaĵo jam delonge malaperis.

La 5-an de januaro 2001 vandalo plurfoje martelis la strigon. Tiu difektado vekis grandan emocion en Dijono. Anstataŭ lasi la strigon en tia stato aŭ anstataŭigi la ŝtonblokon, kie ĝi estas skulptita, oni



decidis ripari ĝin. Muldaĵon de la strigo oni faris en 1988. Ĝi utilis kiel modelo por la riparo, kiu konsistis el inkrustado de ŝtonpeco, poste polurita.

Tiu evento nur pliigis la popularecon de la skulptaĵo en Dijono. Sekve la turisma oficejo elektis ĝin kiel simbolon de sia piediranta vizitvojo, kiu rondiras tra la historia centro, kies nomo estas de tiam “le parcours de la chouette” (la irvojo de la strigo).

La turstrigo, aŭ blanka strigo (*Tyto alba*) estas strigo de la familio titonedoj. Temas pri unu el la plej disvastigitaj birdospecioj en la mondo kaj certe la plej disvastigita inter la noktobirdoj. Tiuj palaj, longaj, longkruraj strigoj senpene flugas, dum ili superflugas paŝtejojn aŭ aliajn ĉasejojn.

Temas pri birdo sufiĉe granda, ĉirkaŭ 33 ĝis 39 cm longa, kun enverguro (etenditaj flugiloj) inter 80 kaj 95 centimetroj, kun meza pezo de 330 gramoj ĉe plenkreskuloj. Ĝi havas karakterize blankan vizaĝan diskon kun formo de koro, kun supraj ambaŭflankaj lokoj por la okuloj kaj anguleto centre, por montri la bekon al idoj, kiuj bezonas tiun indikilon en tiom blanka vizaĝo, kie ankaŭ ege kontrastas



la nigraj okuloj. Supraj partoj, tio estas la dika kapo (ŝajne senkola), dorso kaj flugiloj estas helbrunaj aŭ orbrunaj, tre bele ornamitaj per grizaj punktoj aŭ makuletoj. La longaj kruroj estas parte plumaj kaj havas la fingrojn kovritajn de blankecaj haroj, kiuj ofte ne estas tiom blankaj kaj aspektas malpuraj. Ambaŭ seksoj estas similaj, sed inoj povas esti iom pli grandaj, malhelaj kaj punktitaj sube.


La flugiloj estas grandaj kaj rondoformaj, tial turstrigo ne estas tre lerta fluganto, sed ĝi estas absolute silenta, kio ege efikas por kapti predojn. Turstrigoj havas rimarkindan laŭtan blekon, iom funebrecan, se aŭdata de proksime. Ili troviĝas ĉie en la mondo, sur ĉiu kontinento, krom Antarkto. Turstrigoj manĝas kampomusojn, sorikojn (pintomusojn), ranojn kaj insektojn kaj estas ekonomie valoraj, ĉar ili ankaŭ predas pestojn, kiel ratojn, talpojn kaj musojn. Ili profitas efikegan aŭdkapablon por kapti predojn, tiom ke ili kapablas predi eĉ en tute absoluta malhelilo. Ankaŭ vidkapablo estas efika, se konsideri, ke la turnokapableco de la kolo havigas al la turstrigo preskaŭ 360 gradojn de vidkampo. Tiu ĉi strigo pro sia specifa metabolismo povas manĝi pli ol iu ajn alia specio de strigo. Matura turstrigo manĝas

proksimume tri musojn ĉiutage.

Turstrigoj ĝenerale vivas inter 5 kaj 11 jarojn. Krom homoj (trafiko kaj frapoj kontraŭ kabloj) kaj hejmbestoj, kiel katoj, ili havas malmulte da predantoj. La tutmonda loĝantaro estas supozata iom malpli ol 5 milionoj da individuoj. Plej ofte ili estas tre fidelaj al siaj teritorioj.

Por reproduktiĝi la specio preferas homloĝatajn lokojn, eĉ se homoj jam foriris, kiel kampardomoj, subtegmentoj, turoj de preĝejoj (de tie la specifa nomo), ruinoj, grenejoj ktp. Ili povas nestumi ankaŭ ĉe maljunaj trunkoj en ĝardenoj, foje klifoj ktp. Ili povas reproduktiĝi en ĉiu ajn sezono; la ino ovumas 4 ĝis 7 ovojn, kiujn ŝi kovos dum ĉirkaŭ 32 tagoj. La kovado estas tasko nur de la ino, dum la masklo ĉasas por la tuta familio. La idoj estas kovritaj de blanka lanugo. Kvankam post 50 tagoj la idoj kapablas flugi, plej ofte ili ne malproksimiĝas de la gepatroj ĝis esti 3-monataj.

La libro *La sekreto de la strigo de Dijono* estas fabelo de Magali Lautrou, bele ilustrita de Jean-François Drouin, ambaŭ anoj de la Esperanta klubo de Dijono. Ĝi rakontas eksterordinarajn aventurojn en la mezepoko de Agata, ĉarma turstrigineto en la stratoj de Dijono. La libro finiĝas per dupaĝa klarigo de la hipotezoj de la origino de la strigo de Dijono. La libro estas eldonita en 4 versioj: franca, angla, germana kaj Esperanta. Ĝi estas vendata en la turisma oficejo kaj en librejoj de Dijono, inkluzive en Esperanto. Eblas aĉeti ĝin ankaŭ sur la retejo de la eldonejo "Graine de Moutard", [www.grainedemoutard.fr](http://www.grainedemoutard.fr)






Renato Corsetti:

# Poemo de Nazim Hikmet

Nazim Hikmet estis turka poeto (1902 – 1963), kiu verkis sennombrajn poemojn en la turka.

**P**ro la progresema enhavo de liaj poemoj, ili estis tradukitaj al dekoj da lingvoj en la tuta mondo. Finfine nun 60 liaj poemoj estas tradukitaj ankaŭ al Esperanto, de la turka esperantisto Vasil Kadifeli, helpata de Renato Corsetti kaj Vastalto kiel reviziantoj: Poezia antologio. Nazim Hikmet Ran. 2016, 203 paĝoj. (Legu pli en *Juna Amiko* 4/2016, p. 12).

El la aperinta libro ni prezentas al la legantoj de *Juna Amiko* unu el la poemoj.



## Donkiĥoto <sup>(1)</sup>

*La kavaliro de la eterna juneco  
en sia kvindeka jaro obeis al sia menso,  
kiu batadis ene de lia koro.  
Iun julian matenon, li eliris por sia konkero  
de belo, rajto kaj pravo.*

*Antaŭ li la fieraj, stultaj gigantoj de la mondo,  
sub li la malĝoja sed heroo Rosinanto<sup>2</sup>.*

*Mi bone scias, kio estas senti puran sopiron al io,  
sed se onia koro pezas nur malmulte,<sup>3</sup>  
ne estas eliro, mia Donkiĥoto, nenia eliro.  
Oni vane batalos kontraŭ la ventomueliloj.*

*Vi pravas, certe via Dulsineo<sup>4</sup> estas la plej bela  
virino de la mondo.*

*Certe vi estas tiu, kiu krios tion  
al la vizaĝoj de la stratvendistoj  
kaj ili renversos vin  
ili ankaŭ simple batados vin.*

*Sed vi estas la nevenkebla kavaliro de nia deziro,  
vi, kiel flamo daŭros bruli  
en via peza, fera ŝelo  
kaj Dulsineo iĝos duoble bela.*

\*\*\*\*

<sup>1</sup> “Don Kiĥoto” estas la nomo de romano kaj de la heroo de romano de la hispana verkisto Cervantes (Servantes). Sed en la hispana “Don” estas la vorto por “sinjoro”, do la tuta esprimo signifas Sinjoro Kiĥoto. Ni ne rajtas supozi, ke esperantistoj en la tuta mondo scias pri ĉi tiu apartaĵo de la hispana, kaj pro tio ni konsideras la tutan esprimon kiel nomon kaj skribas ĝin en unu vorto.

<sup>2</sup> “Rosinanto” estas la nomo de la ĉevalo de Donkiĥoto. Tiu nomo en latinidaj lingvoj estas simila al la nomo por “laborĉevalo”, “malbona ĉevalo”. Do, ĝi sonas iom ironie.

<sup>3</sup> En la originalo la koro pezas “unu okaon kaj kvarcent draĥmojn”. Temas pri malnovaj pez-mezuraj. “Okao” estas egalvalora al 1,282 kilogramoj aŭ 400 “draĥmoj”.

<sup>4</sup> “Dulsineo” estas la revata amatino de Donkiĥoto. La nomo en latinidaj lingvoj aludas al “dolĉo”.

En la originalo oni parolas pri “bezirgan-oj”, malnova turka vorto, kiu signifas “komercisto”, homo, kies nura intenco estas profito.

# Heliko hastis hejmen!

La rubrikon  
prizorgas:  
Stefan MacGill



Jen ŝerco pri heliko, kiu ne estas finita. Vi devas eltrovi la lastan frazon.

**P**or fari tion, kompletigu la kruc-enigmon. Tio ne estas enigmo de la kutima speco! Vi ne havas helpindikojn, vi ricevas nur la uzendajn vortojn, kiujn ni aranĝis laŭ la nombro da literoj (kaj alfabeto ene de ĉiu grupo). Kiam vi sukcesis enskribi la vortojn, kaj forstrekis ilin el la listaro, vi trovos, ke restas kvin vortoj. Aranĝu ilin por kompletigi la ŝercon.

**Vundita heliko estis portita en ambulanco.**

**“Kio okazis al vi?” demandis la kuracisto.**

**“Nu, mi freneze rapidis hejmen, sed...”**

\_\_\_\_\_!  
\_\_\_\_\_!

**Jen la vortoj uzendaj en la enigmo:**

**Duliteraj:** ER, IA, KS, MI TE US

**Triliteraj:** BAR, PRI, POT

**Kvarliteraj:** AGLO, AKEN, ONIN, STAT

**Kvinliteraj:** ANTAŬ, EZOKO, INTER, INUND, OKAZE

**Sesliteraj:** LITERO, SUBITE

**Sepliteraj:** ADORINT, AGARIKO, ALFABET, FOTISTO, KRESKIS

## Vortklarigoj

**Agariko:** speco de granda fungo


**Akeno:** seka frukto, ankaŭ urbo en Germanio.

**Ambulanco:** Sav-veturilo


**Hasti:** Rapidi

**Kuracisto:** medicina doktoro

**Ŝerco:** Humura, ridiga rakonteto.



**Solve la antaŭa numero**





## Landaj Rezentantoj – Perantoj de Juna Amiko

**Argentino:** [info@esperantoargentina.org](mailto:info@esperantoargentina.org). **Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au). **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at). **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; [financoj@fel.esperanto.be](mailto:financoj@fel.esperanto.be). **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; [belabutiko@esperanto.org.br](mailto:belabutiko@esperanto.org.br). **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk). **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; [mrvp@interpres.org](mailto:mrvp@interpres.org). **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady III.; [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz). **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; [arke.gong@qq.com](mailto:arke.gong@qq.com). **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 Koebenhavn; [arnecasper@dbmail.dk](mailto:arnecasper@dbmail.dk). **Estonio:** Ahto Siimson, Kastani 12-11, Paikuse, EE-86602 Pärnu maakond; [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee). **Finnlando:** Hämäläinen Sylvia, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi). **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Ceresaie, FR-75004 Paris; [zav@esperanto-panorama.net](mailto:zav@esperanto-panorama.net). **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; [wolfgang.schwanzer@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzer@esperanto.de). **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de). **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thokoly ut. 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; [hungario@gmail.com](mailto:hungario@gmail.com), [www.esperantohea.hu](http://www.esperantohea.hu). HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; [simio\\_2004@yahoo.es](mailto:simio_2004@yahoo.es). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; [esperanto@isl.is](mailto:esperanto@isl.is). **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-53490 Givatajim; [saviogp@zahav.net.il](mailto:saviogp@zahav.net.il). **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; [silkovojo@aliceposta.it](mailto:silkovojo@aliceposta.it). **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp). **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; [marija@hes-keu.hr](mailto:marija@hes-keu.hr). **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; [irenaa@takas.lt](mailto:irenaa@takas.lt). **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne; [akbondhus@jkn.no](mailto:akbondhus@jkn.no). **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz). **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatar, Koźmicie Wielkie 323, PL-32-020 Wieliczka; [mtatar@gmail.com](mailto:mtatar@gmail.com). **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; [asocio@esperanto.pt](mailto:asocio@esperanto.pt). **Rumanio:** Crancau, Ioan, B-dul Bucuresti 5/53, RO-4800 Baza Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; [sezonoj@mail.ru](mailto:sezonoj@mail.ru). **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; [zciric2@gmail.com](mailto:zciric2@gmail.com). **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net). **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B lgh 1303, SE-931 38 Skellefteå; [leif.holmlund@telia.com](mailto:leif.holmlund@telia.com). **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch). **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; [rezamenhof@yahoo.com](mailto:rezamenhof@yahoo.com). **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome, Togo; [esp.togo@cafe.tg](mailto:esp.togo@cafe.tg). **Usono:** Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530; [usa@esperanto-usa.org](mailto:usa@esperanto-usa.org). **Venezuelo:** Peter Jaimez, Poŝtkesto 3482, VE-1010 A Caracas. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; [uea@uea.org](mailto:uea@uea.org). **Mendojn eblas sendi ankaŭ al ILEI.oficejo@gmail.com.**



# Halina Komar: Festanta verda Słupsk

**Ludoviko Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko kaj mortis en Varsovio. Tamen lian centan mortodatrevenon honorigis la urbo Słupsk (Pomerio, Pollando) per Zamenhofa Jaro 2017.**

**L**a urbo Słupsk decidis celebri Zamenhofan Jaron laŭ rezolucio de Unesko (novembre 2015), okaze de la centa datreveno de lia morto (14.04.1917).

En la tuta mondo oni memorigas Zamenhof, la kreinton de Esperanto kaj ideoj je frateco, paco, toleremo kaj interkompreniĝo de nacioj, sub aŭspicioj de Unesko, kiu konstatis, ke la Esperanto-idearo identas kun noblaj celoj de tiu ĉi mondskala institucio.

Ne unufoje Unesko subtenis iniciatojn de UEA. Jam pli ol 60 jarojn la Esperanto-movado troviĝas en la kampo de ĝiaj interesoj.

La solena inaŭguro okazis en Słupsk laŭ la volo de urba estraro, pro iniciato de ĝia prezidanto d-ro Robert Biedroń (esperantisto), kiun subtenis unuvoĉe la urba konsilantaro.

Nia Centro de Interkultura Edukado el Nowy Sącz partoprenis la eventon kiel la kunorganizanto.

La aranĝo estis reĝisorita kaj koordinita de Jolanta Krawczykiewicz, direktorino de la Urba Kulturcentro, kun helpo kaj kunlaboro de la Urba Kultura Fako. Oni planis realigi la eventon ĉe la strato de L. Zamenhof, sed veteraj kondiĉoj malebligis tion. Tial la aranĝon oni translokiĝis al sporta halo, moderna kaj komforta, tre taŭga por tia celo.



Estis instalitaj paneloj de tiel nomata “Senata Ekspozicio” pri Zamenhof kaj Esperanto, kiun Kazimiro Krzyżak donacis al la urbo kun la espero, ke oni trovos lokojn en lernejoj kaj bibliotekoj, kie eblus ekspozicii ĝin dum la tuta Zamenhofa Jaro 2017.

La partoprenantojn salutis vicprezidanto de la urbo Krystyna Danilecka Wojewódzka, kore kaj interese rakontante pri la kreinto de la lingvo internacia, instigante la junularon al lernado de Esperanto. Ĝojigis nin informoj pri la jam komencita instruado de Esperanto en bazaj lernejoj kaj planoj pri enkonduko de la lingvo en aliajn... Okazis marŝo tra la urbo al obelisko de Zamenhof, staranta en parko antaŭ la urbodomo.

Dum la programo dufoje kantis la ensemblo Esperanto-Familio (ĝia juna parto, arte gvidata de Alicja Skalska) kun esperantlingva repertuaro. Junulara publiko entuziasme ĉeestis la programon – dancante kaj kunkantante la refreojn. La plej junaj lernejanaj ekinteresiĝis pri aventuroj de Mazi en Gondolando (filmetoj) de Marian Zdankowski el Olsztyn, kun premioj al partoprenantoj. Sekvis amuza leciono de Nina Pietuchowska el Bjalistoko, kiu premiis la plej diligentajn lernantojn. La tutan tempon oni povis bonguste manĝi produktojn kun Esperantaj nomoj.

Danke al Pola Poŝto eblis aĉeti specialajn poŝtkartojn, eldonitajn okaze de la jubilea evento, kun speciala stampilo.

Posttagmeza parto de la programo

okazis en Teatro Rondo, kie estis prezentita monodramo de Mario Migliucci “Doktoro Esperanto”, fare de Helena Biskup el Sztum, kiun akompanis kantante Małgorzata Kaczanowska el Nowy Sącz. Pri sia nova libro “Zamenhof en Varsovio” prelegis Roman Dobrzyński el Varsovio.

Ni ĉiuj estas feliĉaj, ke ni povis ĉeesti la Inaŭguron de Zamenhofa Jaro en Pollando en la bela urbo Słupsk.



# Festanta verda Słupsk

